# BEKkurso PEPAS

dennis keefe, www.bekkurso.info

## 31-D Integrighaj Ekzercoj por 31-A, 31-B, kaj 31-C

Parolekzerco I 31-A kaj 31-B ( 15 frazoj )

Mi ne venis al la kurso de Esperanto **antauh 20 minutoj**. Mi venis antauh 30 minutoj. Mi ne manghis antauh du horoj. Mi manghis antauh kvin horoj. Mi ne vidis la filmon antuah unu semajno. Mi vidis ghin antauh unu monato. KTP

Parolekzerco II 31-A kaj 31-B ( > 20 frazoj ) <u>Unue, faru skriban hejmtaskon kun viaj propraj ideoj</u>. Poste, faru vian parolekzercon.

1. En januaro, Petro ekloghis en Novjorko.
2. En februaro, li komencis novan laboron.
3. En marto, lia amiko de Hispanio gastis che li.
4. En aprilo, Petro vizitis la Muzeon de Novjorko.
5. En majo, li komencis lerni Esperanton.
6. En junio, li finis la kurson de Esperanto.
7. En julio, Petro ceestis Kongreson de Esperanto en Chinio.
8. En auhgusto, li feriis che la marbordo.
9. En septembro, lia maljuna onklo mortis.
10. En oktobro, naskighis bebo en la apuda loghejo.
11. En novembro, Petro malsanighis, sed rapide resanighis.
12. En decembro, li skiis en la montaro de okcidenta Usono

Parolekzerco III 31-C ( > 20 frazoj ) Modifu la modelon lauhplache, sed konservu la tagojn de la semajno kaj la kontrasto inter *kutime* kaj *lastfoje*. Lernu: *lastan x-on.*

Lundi, mi kutime rigardas televidon, sed lastan lundon, mi ne faris tion. Mi iris al la kinejo. Mardi, mi kutime manghas hejme, sed lastan mardon, mi ne faris tion. Mi manghis en restoracio. Merkrede, mi ludas futbalon, sed lastan mardon, mi tion ne faris. Mi restis hejme. Jauhde mi lavas miajn vestajhojn, sed lastan jauhon mi ne faris tion. Mi . . . . KTP.